

ĜENERALA KUNVENO DE MADRIDA E-LICEO

La 28-an de januaro en nia sidejo okazis Ĝenerala Kunveno de Madrida Esperanto-Liceo, laŭ la kunvoko antaŭe sendita al ties anoj.

Oni aprobis la resumon pri disvolvitaj aktivaĵoj, kiu estis dum 2018 tre kompleta kaj riĉa, ekstere kaj interne. Specife la organizado de kongresoj nacia kaj de instruistoj estis grava atuto de la asocio. Ankaŭ disvolviĝis kursoj, prelegoj, kunvenoj, ekspozicioj kaj aliaj agadoj.

Ankaŭ estis aprobita la ekonomia bilanco. Ĝi estis pozitiva, grandparte pro la akiro de subvencio ĉe urbestrado pro la okazigo de la Lingva Festivalo ene de la someraj kongresoj.

La membronombro estas stabila, kun tri novaj anoj, kaj tri malaligoj pro manko de kotiz-pago. La nombro de anoj de la grupo estas 40. Ni profitas la okazon por memori ke se vi ankoraŭ ne estas membro, vi povas aliĝi al MEL kontraŭ kotizo de nur 12 eŭroj jare (en la ĝenerala kunveno oni decidis konservi la kvanton). La aliĝilon vi trovos en la fakdo "dokumentoj" de la retejo de MEL <http://esperanto.es/mel/>, kaj vi povas profiti ankaŭ iun viziton al la klubejo.

Oni aprobis ankaŭ la buĝeton por 2019, kiu estos de 1900 eŭroj, por en- kaj el-spezoj. Oni aprobis la programon de aktivaĵoj por 2019, kiu entenas la organizadon kaj partoprenon en kursoj, prelegoj, ekspozicioj, disvastigo en la reto, kunvenoj, ktp. Ne estis modifoj en la estraro de la grupo.

KURSOJ POR PROGRESANTOJ

La nova kurso por progresantoj, gvidota de Andy Hernández, pri kiu ni informis en la pasinta numero, prokrastiĝis du semajnojn, kaj do vi ankoraŭ havas la ŝancon aliĝi al ĝi. Ĝi komenciĝos la lundon 4an de februaro, kaj la klasoj disvolviĝos ĉiulunde vespere, inter la 16 kaj 18 horoj. Ni denove atentigas ke necesas havi jam iujn konojn de Esperanto, kaj ke oni kontrolos tion en la unua tago. Por aliĝo aŭ demandoj, kontaktu rekte kun Andy ĉe andyflorida@hotmail.es.

Ankaŭ eblas aliĝi al la kurso plu okazanta en la Oficiala Lingvolernejo de Fuenlabrado. La nunaj lernantoj trapasis elementan ekzamenon, kaj daŭrigos progresigan kurson ĝis la mezo de junio. Se vi loĝas proksime kaj havas ian nivelon de Esperanto, kontaktu kun la klubo por vidi kiel vi povas aldoniĝi al la kurso.

MIGUEL FERNÁNDEZ EN RADIO UTOPIA

La alternativa Radio Utopía interparolis kun la esperanta poeto Miguel Fernández, pri Esperanto kaj aliaj aferoj, la 18an de januaro en la programo "Olvida tu equipaje". Radio Utopía estas alternativa radio, sufiĉe multe aŭskultata en la nordo de Madrido, kaj ankaŭ pere de la reto, kaj jam pasintjare en la monato marto gastigis esperantistojn.

La radio aŭskulteblas kiel podkasto en <http://www.radioutopia.org.es/olvida-tu-equipaje/>, kaj specife en <http://www.radioutopia.org.es/audio-publicado-mp3-olvida-equipaje-miguel-fernandez-poeta-esperantista-persona/>.

RAPORTO PRI LA EKSPOZICIO EN FUENLABRADO

Oni povas legi bonan raporton pri la ekspozicio pri Esperanto, kiu estis muntita ĝis la 8-a de januaro en la Junta de Distrito (municipa oficejo) de la kvartalo Loranca en Fuenlabrado, en la retejo "El sueño de Zamenhof", pri kiu ni informis en nia antaŭa numero. Vidu la ligilon <https://lalenguadezamenhof.wordpress.com/> aŭ pli rekte: <https://bit.ly/2DNmFLd>.



Hispana Esperanto-Federacio memorigas en sia lasta elektronika bulteno ke la ekspozicio estas je la dispoŝo de tiuj grupoj aŭ esperantistoj kiuj deziras prezenti la lingvon en iu kultura aŭ eduka institucio.

En la retejo de HEF ĉe <http://www.esperanto.es/hef/index.php/385> oni priskribas ĝin pli detale, kaj HEF ankaŭ pretigis informan dosieron, konsulteban kaj elŝuteblan el la sama retejo en la adreso:

http://www.esperanto.es/hef/images/expo/exposicion_esperanto.pdf. Do, ĉiu el niaj legantoj, kiu deziras disvastigi la lingvon kaj havas iun kontakton kun kulturaj, edukaj aŭ sociaj instancoj, povas mem proponi la elmontron de la ekspozicio.

TRIKONGRESO EN MALAGO

Pluraj madridanoj jam aliĝis al la *Trikongreso* de Malago, tio estas, la koincido de la Hispana Kongreso de Esperanto, la Andaluza kaj tiu de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (IFEF), kiuj komenciĝos ĉijare en la ponto de la 1a de majo, kaj povos daŭri, por tiuj kiuj disponas je pli da tempo, eĉ ĝis la 9a.

Jam aperis multaj informoj en la oficiala retejo, ĉe la adreso <http://esperanto-andalucia.info/>. Interalie, oni anoncis la okazigon de oficialaj KER-ekzamenoj. Ankaŭ estis anoncataj prelegoj kaj diskutoj pri la ĉeftemo "Lingva situacio en Eŭropa Unio", aktuala post la anoncita eliro de Britio el la EU. Aliaj kunvenoj, muziko, distraj aktivadoj, ekskursoj, ktp kompletigos la programon.

Jam pli ol 110 homoj aliĝis al unu aŭ ĉiuj kongresoj. Skribu al kongreso@esperanto.es se vi havas dubojn aŭ deziras pliajn detalojn.

KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. La unuasabata renkontiĝo okazos la 2-an de februaro, denove en kafejo de kulturcentro MediaLab Prado, strato Alameda 15, vidalvide de la Kulturcentro Caixa Forum, je la 5a posttagmeze.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al nivocho@gmail.com